Heinrich Heine,

# Printempa saluto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret'
Tra de mi animon.
Sonu printemo kantet'
En la malproksimon!

Ĝis la dom' forsonu vi,
Kie floroj pendas!
Diru al la roz', ke mi
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919) en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14 15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi aperis en programo de koncerto el la jaro 1908 (laŭ informo de la dana s-ano Lars Kromann [*`lars.kromann@mail.dk`*]. Pri Ludwig Emil Meier rigardu ankaŭ la vikipedian retejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier`*. Li verkis interalie la kantlibreton "Esperantista Kantaro", kiu aperis en 1907 ĉe la Esperanta eldonejo de Hans Theodor Hoffmann en Berlino.*

Heinrich Heine,

# Milde fluas tra la kor'

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor'
kanto primavera.
Flugu, melodi-sonor',
en la vast' aera.

Flugu longe, sen ripoz',
super domoj flutu.
Se troviĝos tie roz' –
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo "Frühlingsbotschaft" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15 17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas - kun permeso de s-ro Valentin Melnikov - prenita el ties reta kolekto* `http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov` *. Vidu:* `http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html`*. Vidu ankaŭ:* `http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html`*.*